


# TEA-BULTENO

6A JARO | JULIO - AÚGUSTO 2003 | NUMEROJ 7-8

## La Carsiana



Sekve de la invito de Donatella Ermacora, anino de Triesta Esperanto-Asocio, sperta pri ĉio koncernanta flaŭron kaj faŭnon en nia regiono, kaj speciale pri la fenomeno "Karsto", firma defendanto de la natura medio, ĝenerale kaj loke, pluraj triestaj esperantistoj vizitis la botanikan ĝardenon *Carsiana*, en Sgonico, apud Trieste, komence de la pasinta junia monato. Estas subkomprenite, ke ŝi estis nia gvidisto, akompaninta nin tra la padoj de la ĝardeno, sub konstanta, senfina, foje preskaŭ torenta pluvo. Sed tiu akva lavango verdire ne tiom ĝenis la vizitintojn: fakte ĉiuj tre atente aŭskultis la klarigojn de tiu fakulino, kaj je la fino ĉiuj konsentis, ke valoris la peno malsekiĝi kaj iom tremeti sub tiu daŭra duŝado por pli kleriĝi pri la varieco kaj diverseco de nia ĉirkaŭanta naturo. Jes, vere valoris la peno! Fakte viziti tiun ĝardenon, malhavante la eblon aŭskulti tiel klarajn kaj tiom interesajn eksplikojn pri tiu ampleksa natur-fenomeno kia estas nia Karsto, ne donas ĝeneralan ideon pri la tuto, ĉefe kiamaniere oni projektis kaj kreis tiun "subĉielan muzeon", havante je dispono nur etan teritorion, sur kies grundo oni sukcesis reprezenti la plurajn aspektojn de la karsta flaŭro.



Ĉi tiu ĝardeno ekestis en 1964 dank' al bonvolemo de areto da natur-studantoj/amantoj, celanta konservi kaj arigi la plej signifoplenajn speciojn ekzistantajn en Karsto. Oni precipe zorgis prezenti al vasta publiko la plej facile rekoneblajn kaj la plej diversajn karstajn mediojn, klopodante konservadi kaj evidentigi la specifajn trajtojn de veprejoj, subarbarejoj, dolinoj, surrokaj vegetaĵaroj kaj ŝtonaraj deklivoj. Ĉe ĉiu planto - ĉu floro, ĉu herbo, ĉu arbo - estas klare skribitaj la nomo de la specio, la scienca termino, eĉ la vulgara se ekzistas, la familio, ties geografia situo kaj la florperiodo. La tuta strukturo fariĝas tiele taŭga instrumento de edukado pri la loka medio kaj kontribuas al fakta konsciiĝo de la loĝantaro pri la posedo de tia natura trezoro: inter alie ĝi povas sendube instrui kiel korekte agi por konservado de la teritorio kaj de ties rimedoj.



Ni sugestas al vi iam viziti "*Carsiana*"-n por pli bone konatiĝi kun via propra natura ĉirkaŭaĵo, kaj poste informadu pri ĝi viajn amikojn, enlandajn kaj eksterlandajn, ĉar tiu ĝardeno estas grava unikaĵo de nia regiono, kie plantoj elkreskas el speciala grundo aĝanta pli ol 120 milionojn da jaroj!

## PROGRAMO EN TEA - JULIO

| | |
|---|---|
| 01 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 02 - merkredo | h. 18.00 - Koruso "Verdaj Anĝeloj" |
| 04 - vendredo | h. 20.00 - Aranĝo por Seminario pri interpretado |
| 08 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 09 - merkredo | h. 18.00 - Koruso "Verdaj Anĝeloj" |
| 11 - vendredo | h. 20.00 - *Lecturae Dantis* en Esperanto |
| 15 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 16 - merkredo | h. 18.00 - Koruso "Verdaj Anĝeloj" |
| 18 - vendredo | h. 20.00 - Kartludado |
| 20 - dimanĉo | Vespermanĝo kun estonoj ĉe Junular-Gastejo apud Miramare. Ĉiĉeronoj estas bezonataj: bonvolu antaŭanonci vin! |
| 22 - mardo | h. 20.00 - Somera Festo en TEA |

**ATENTU! ATENTU! ATENTU!**

**TEA-sidejo estos fermita de la 23ª de julio ĝis la 31ª de aŭgusto. Bonan feriadon al vi ĉiuj kaj ĝis la revido je la 2ª de Septembro!**

En programo estas antaŭviditaj unuagrada kurso (**ĉiuĵaŭde, je la 18ª h., ekde la 19ª de sept.**), konversacia rondo, esplorado de TEA-arkivo, projekciado de diapozitivoj kaj multo alia ankoraŭ.

La **18ªⁿ de aŭgusto** alvenos en Triesto alia grupo de estonoj: sama programo kiel je la 20ª de julio!

Kaj jam nun skribu en via kalendaro, ke, dimanĉon la **14ªⁿ de septembro**, ni surgrimpos Monton *Forno*, apud *Arnoldstein*, por la tradicia Festo de Amikeco.

## *Kie libertempadi en Esperantujo?*

### 71ª Itala Kongreso de Esperanto
### 27-31 aŭgusto 2003 - Ancona – Portonovo
### Temo: Pacaj lingvaĵoj

Ancona aŭ, plej ĝuste, ĝia marbanejo Portonovo, estos la cijara ĉefurbo de Itala Esperantujo. Tie okazos, de la 27ª ĝis la 31ª de aŭgusto, la 71ª Nacia Kongreso de IEF en belega kongresejo ĉe Hotel *La Fonte*.

La ĵus naskiĝinta G.E.M. (Gruppo Esperantista Marchigiano) LA VERDA PEGO jam delonge laboras, kune kun IEF, por prezenti al vi allogan programon, por igi vian surlokan restadon neforgesebla. Portonovo estas angulo en Konera Riviero, unu el la plej belaj lokoj en la

tuta Adria marbordo. Ne temas pri amasa strando: tie estas nur tri hoteloj kaj kelkaj restoracioj. Ĉiam hela la akvo en la golfeto kaj sufiĉe trankvila (ankaŭ en 2002 Portonovo ricevis la "bluan flagon"!), la ŝtoneta plaĝo estas sieĝita de unika mediteranea makiso kun pinaj ombreloj, kiuj proksimas la gruzan subsunan kuŝejon! Supre imponas Monto Konero per sia majesta kruteco. Hotel *La Fonte* estas sidejo de la Kongreso kaj tre komforta (kvarstela) restadejo; sed se iu deziras "princan" loĝejon, li povas mendi, tute apude, ĉambron en la Hotelo *Fortino Napoleonico*: temas pri fortikaĵo konstruigita de Napoleono por kontroli la navigadon en la marspegulo. Nun ĝi estas luksa hotelo kun fenestroj kiuj malfermiĝas rekte al la maro.

TEA-anoj petu aliĝilon kaj informojn de la sekretario.

## Atentigo por Italoj!

CANDIDATURE AL CONSIGLIO NAZIONALE FEI

Nell'ambito del congresso nazionale avranno luogo le elezioni per il rinnovo del consiglio nazionale e del collegio revisori dei conti. A tale proposito si ricorda l'importanza di avere nuove candidature. É infatti necessario che il consiglio si rinnovi e che tutti contribuiscano alla conduzione della federazione. Per eventuali candidature siete pregati di mettervi in contatto con:

Itala Esperanto-Federacio - fei@esperanto.it
via Villoresi, 38 - 20143 Milano - Tel+fax 0258100857
o con Laura Brazzabeni
segretario generale lbrazza@libero.it

## Programo de E-centro Kvinpetalo por la Jaro 2003

| | |
|---|---|
| 08-12 jul. | Radiofonia teatraĵo kun realigo de KD *Serge Sire kaj Georges Lagrange* |
| 15-19 jul. | Realigo de bildrakontoj (ne necesas esti kapabla desegni) - *Serge Sire* |
| 22-26 jul. | Inicado kaj praktikado de Esperanto *Mariette Bernardin* |
| 22-26 jul. | Praktikado laŭ Freinet-metodo - $2^a$ nivelo *Suzanne Bourot* |
| 12-16 aŭg. | Io pri muziko kaj praktikado de la lingvo *Anne-Sophie Markov* |
| 13-23 aŭg. | Preparado al altaj studoj - skriba kaj parola parto *Janine Dumoulin kaj Georges Lagrange* |
| 12-19 sept. | Instruado kaj vivo de Andreo Cseh kun provlecionoj de la Cseh-kurso *Ed Borsboom* |
| 12-19 sept. | Piedmigrado kune kun *Monique Dussenty kaj Thérèse Pinet* |
| Lasta Oktobra Semajno | Praktikado de la lingvo - $2^a$ nivelo *Suzanne Bourot* |
| Lasta Oktobra Semajno | Praktikado de la lingvo - $3^a$ nivelo *Georges Lagrange* |
| 06-10 dec. | Zamenhofa Semajno: Zamenhof kaj medicino - *Jean-Luc Tortel* |

Kvinpetalo Esperanto-Centro - Rue du Lavoir
FR-86410 Bouresse Rete: kvinpetalo@club-internet.fr

La Internacia Esperanto-Konferenco 2003 okazos en Prago (CZ) de la $19^a$ ĝis la $25^a$ de julio. La Konferenca ĉeftemo estos: *Intimaj temoj en la Esperanta Beletro*. Ĝin pritraktos elstaraj prelegantoj, i.a. Gerrit Berveling, Christian Declerk, Miroslav Malovec, Eugène de Zilah. Ili tuŝos tiun temon el la diversaj flankoj kiuj tiom influas la homajn rilatojn kaj la vivon entute. Honora gasto estos la famkonata verkistino Eli Urbanová, kiu prezentos sian lastan poemaron *Rapide pasis la temp'*. Ŝi en 2001 ricevis la OSIEK-premion por la aŭtobiografia romano *Hejtaro dancas*.

Ankaŭ ĉijare dum la konferenco estos atribuita la premio, kiu estos aljuĝita al verko ricevinta la plej multon da voĉoj de OSIEK-membroj.

Surloka organizado de KAVA-PECH, agentejo de Petro Chrdle, rilate al tranoktado, ekskursoj k.s. estas garantio de bonkvalita servado.

*Pliajn informojn kaj aliĝilojn bv. peti de TEA-sekretario*

# Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto n. 15

## Pri la vortoj *KOREO* kaj *EGIPTO*

En 1988 la Akademio de Esperanto faris decidojn pri la vortoj KOREO kaj EGIPTO. Tiuj decidoj estis unue publikigitaj en *La Letero de l'Akademio, n-ro 7*, Aprilo-Majo-Junio 1989, paĝoj 2 k. skv., kaj poste en la *Oficiala Bulteno* de la Akademio de Esperanto, N. 11, *Aktoj de la Akademio III*, 1975–1991, paĝoj 61–63.

La Akademio tiam deklaris i.a. jene:

La formo *Koreujo* estas kontraŭfundamenta. La sola formo, kiu obeas la Fundamenton, estas *Koreo* kaj ties anoj estas *Koreanoj*. La sola formo, kiu obeas la Fundamenton, estas la landnomo *Egipto*; ties anoj estas *Egiptanoj*. La Akademio tiam referencis al la $15^a$ regulo de la Fundamenta Gramatiko kaj al la $2^a$ rekomendo pri landnomoj (*Oficialaj Informoj* de la Akademio de Esperanto, n-ro 4, *Aktoj de la Akademio III*, paĝo 49), kiu tekstas jene: "En okazo de konflikto inter du aŭ pluraj formoj por unu sama landnomo aŭ ankaŭ inter la uzo de kategorio aŭ la alia por unu sama radiko, la Akademio rekomendas preferi la plej internacian landnomon kaj tiel obei al la $15^a$ Regulo de la Fundamento".

Reveninte al tiuj demandoj la Akademio nun konstatas, ke la $15^a$ regulo de la Fundamenta Gramatiko pritraktas, kiel "fremdaj" (internaciaj) vortoj kompletigu la vortoprovizon de Esperanto. La Akademio ankaŭ konstatas, ke per si mem tiu regulo ne determinas, kiu ano de internacia vortofamilio fariĝu baza en Esperanto, kaj kiun el la internaciaj signifoj ĝi havu. Tial uzado de la vortoj *KOREO* kaj *EGIPTO* kun genta aŭ landana signifo ne malobeas la $15^{an}$ regulon, same kiel tia uzado de, ekzemple, la vortoj *ĈINO*, *JAPANO* kaj *PORTUGALO* tiun regulon ne malobeas, malgraŭ la fakto ke por ĉiu el ili la internacie plej ofta signifo estas landa. Sekve la Akademio de Esperanto nun deklaras, ke neniu el la landnomoj *Koreo*, *Koreujo*, *Koreio*; *Egipto*, *Egiptujo*, *Egiptio* malobeas al la reguloj de la Fundamento de Esperanto. Per tio la Akademio nuligas siajn antaŭajn decidojn el 1988 pri la vortoj *KOREO* kaj *EGIPTO*.

La Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro
*Bertilo WENNERGREN*

La Prezidanto de la Akademio Prof. *Geraldo MATTOS*

La ĉi-antaŭa nova decido pri *KOREO* kaj *EGIPTO* kon-

sistigas ŝanĝon de la pli fruaj decidoj de la Akademio. En tiaj okazoj la Statuto de la Akademio postulas aprobon de almenaŭ du trionoj de ĉiuj membroj. La nova decido estis aprobita en Marto 2003 per 30 jesaj voĉoj (kun 2 neoj kaj 1 sindeteno). La nombro de la Akademianoj estis tiam 44.

Por kompleteco oni povas trovi ankaŭ la malnovajn, ne plu validajn, decidojn pri *KOREO* kaj *EGIPTO* ĉe la TTT-ejo: www.akademio-de-esperanto.org/decidoj/landnomoj/koreo_egipto-eksaj.php.

## Mallonge pri...

**Zamenhof bone kuras!** Ĉevalo nomita Zamenhof gajnis la 15$^{an}$ de majo, la ĉefan kurkonkurson en Longchamp (Prix du Bois de Boulogne/Premio de la Bulonja arbareto), apud Parizo. La ĵokeo estis S. Pasquier.

*Informis Marc Anselmi, sekretario de Arras Esperanto*

**Afiŝego en Esperanto en Slovenio** Unu el la tri grandfirmaoj pri movebla telefonado en Slovenio *Mobitel* aranĝis reklamkampanjon per afiŝegoj. Sur tiuj, krom la bildo de iu persono, estas nur du vortoj: **multajn salutojn**. Sur ĉiu afiŝo en alia lingvo. Inter la lingvoj estas ankaŭ Esperanto. Do, ne miru, se vi pasos tra slovenaj stratoj kaj renkontos gigantan afiŝon, kiu salutos vin en Esperanto.

**Esperanto-Kafejo en Lyon** Kiu nomiĝas KoToPo. Jen kie trinki bongustan kafon: *Mille et une langues* (mil kaj unu lingvoj) - Adreso: 14, rue Leynaud 69001 - Lyon Tel : +33 (0)4 72 07 75 49; kotopo@esperanto.org

**Literatura Seminario** La Internacia Esperanto-Instituto (IEI) okazigos inter la 31$^{a}$ de oktobro kaj la 2$^{a}$ de novembro 2003 seminarion pri Esperanto-Literaturo en la urbo Den Haag (Nederlando). Pliajn informojn pri la programo, kotizo, loĝeblecoj, ktp, estas riceveblaj ĉe: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando; telefone +31 70 3556677 kaj rete pere de iei001@tiscali.nl

*Informis Atilio ORELLANA ROJAS*

**Urboj en Esperanto! Kaj ankaŭ Trieste!** Estas registritaj informoj pri diversaj urboj en la mondo en Esperanto. La listo nun enhavas 121 urbojn kaj troviĝas ĉe: http://urbo.aliaflanko.de/. Ĉiuj kompletigoj kaj komentoj bonvenas! *Robert Bogenschneider Rete: info@aliaflanko.de*

**Retpaĝaro pri ZEO-j!** En interreto troviĝas retpaĝaro pri Zamenhof-Esperanto-Objektoj, ZEO-j ĉe: http://ikki.pl/esperant/zeo/. En la listo tie aperanta troviĝas 1240 objektoj el 59 landoj. Ĝi estis kreita laŭ la libro "Monumente pri Esperanto - ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-Objektoj en 54 landoj" de Hugo Rölinger. Rigardu kaj kompletigu ankaŭ vi la retpaĝaron! Aliaj informoj kaj kontakto ĉe: Robert Kaminski Rete: lodzo@poczta.wp.pl

**Nova ZEO en Prilep-Makedonio** La 1$^{an}$ de junio estis solene inaŭgurita en Prilep nova ZEO, kiu troviĝas sur la fasado de la domo de la prilepa esperantistino s-ino Aneta Trompeska Dunĝerović (str.Partizanski odredi n-ro 2). Temas pri blanka rondo, kun radiuso de 40 cm, en kiu estas pentrita verdkolora rondo. En ĝi verda stelo, du manoj kaj la teksto "Esperanto" kaj "Ponto por amikeco". Tiuokaze ĉeestis kelkdekoj da esperantistoj kaj gastoj, antaŭ kiuj unue parolis la loka aktivulino s-ino Cvetanka Ilioska Grigorova.

**ZEO en Svisio!** Publika fruktoĝardeno apud Kultura Centro Esperantista, KCE, en La-Chaux-de-Fonds, ricevos la nomon "Esperanto-ĝardeno". La inaŭgura ceremonio okazos la 13$^{an}$ de julio okaze de la malfermo de la 76$^{a}$ Kongreso de Sennacia AsocioTutmonda.

**Esperanto-Servocentro - faka servo por vi!** Se vi pretas uzi Esperanton ne nur en via klubo aŭ dum renkontiĝoj sed ankaŭ en via profesio, nepre enirigu vian firmaon, universitaton, lernejon ktp en la liston de firmaoj Esperante parolantaj. Tiu listo troviĝas ĉe Esperanto-Servo-centro. Tie eblas trovi samfakajn firmaojn aŭ individuojn por posta kunlaboro kaj vi povas ankaŭ varbi vian agadon kaj kunlaboremon. Vi rigardu kaj enskribiĝu en Esperanto-Servocentro ĉe:

http://www.comail.ru/~esperanto/servocentro

*laŭ Mikaelo Chrtilov Rete: mikaelo@km.ru*

**Esperanto - elemento de balotprogramo** La kandidatoj de kataluna partio "Unuiĝo populara de Mataro" (Unitat Popular de Mataro) adoptis Esperanton en la balotprogramo por la alproksimiĝonta urba voĉdonado. Laŭ ties programo, la maldekstra kaj sendependista partio volas "garantii la ĉeeston de la internacia lingvo Esperanto en edukado, publikaj librejoj, kaj uzi ĝin en internaciaj rilatoj kiel pontolingvon ekster la medio de romancaj lingvoj." La programo legeblas en la hispana ĉe:

http://www.cupmataro.org/principis/09_almon.html

**TEJO gajnis!** Tutmonda Esperanto Junulara Organizo, TEJO, gajnis premion de la sveda lingvoinstrua helpagentejo *Tema Modersmal*. Ĝi sukcesis en la kategorio "Multlingva lernanta premio" pro siaj atingoj en la reteja multlingva edukada kreiveco. Oni elektis TEJO-n ĉar ĝiaj retpaĝoj estas publikigitaj en pli ol unu lingvo, tiel ofertante lingvotrejnajn eblecojn. Tiu premio estas la unua internacia honorigo por la interretaj klopodoj de TEJO. Ties gvidantoj ĝojas, ke neesperanta organizo agnoskas ilian laboron al ilia celo por multlingva edukado. Estis iom strange, ĉar oni rekomendis ke ili konsideru lernu.net por la premio, sed anstataŭe ili elektis tejo.org.

*Tema Modersmal* celas kolekti informojn kaj provizi eblecojn diskuti pri ĉio kaj kun ĉiu, kiu estas interesita pri gepatra lingva subteno, instruado de gepatraj lingvaj studoj.

*Informis Marko Naoki Lins Brusela Komunikadcentro Rete: komunikadcentro@esperanto.org*

## Registaro subtenas UK-n!

La 22$^{an}$ de majo Litovia Registaro donis 50000 lidojn (14.500 eŭrojn) al Litova Esperanto-Asocio por parte financi komencajn organizajn laborojn de la 90$^{a}$ Universala Kongreso de Esperanto, okazonta de la 23$^{a}$ ĝis la 30$^{a}$ de julio 2005 en Vilnius. La mono estos uzata por eldonado de literaturo pri Litovio en Esperanto. Tio estas nur malgranda parto de financa subteno donota de Litovia Registaro por diversaj projektoj de la Landa Asocio, ligitaj kun la venonta UK. Financa subteno estas atendata ankaŭ de Vilniusaj urbaj instancoj kaj de urbo Kaunas, kie okazos kelkaj aranĝoj dumkongresaj.

**La jenon diris pri Esperanto... Ingemund Bengtsson**, prezidinto de Sveda Parlamento: "...Al tiuj kiuj asertas, ke Esperanto estas nur bela revo, jam aĝanta pli ol 100 jarojn, mi respondas, ke ankaŭ Paco estas bela homara revo, aĝanta pli ol 1000 jarojn, tamen oni ankoraŭ ne rezignas ĝin alstrebi".

## Rumana vortaro - ni kuneldonu!

Aperis en septembro 2002 vortareto de Ionel Onet, *Poŝvortaro Esperanta-rumana* kaj *rumana-Esperanta*. Jam la 500 ekzempleroj elĉerpiĝis ene de 6 monatoj. Oni devas reeldoni ĝin.

Tial nun estas bezonataj 300 eŭroj por kunfinanci la eldonon. Se vi volas ebligi tion, bonvolu sendi vian kontribuon al UEA por la Fondaĵo EDUKADO, klare indikante "por rumana vortaro". Tiuj, kiuj donacos pli ol 25 eŭrojn, ricevos kiel dankesperimon ekzempleron de la vortareto.

## Reta reeldono de grava esperantologia verko

Unuafoje UEA disponigas elektronikan eldonon de ampleksa publikaĵo. Temas pri aktualigita BIBLIOGRAFIO DE VORTAROJ, origine komplita de Edward Ockey en 1982ª jaro. La bibliografia listo estis enkomputiligita kaj parte ĝisdatigita de Geoffrey Sutton, sekve de kio ĝi ricevis novan titolon: "Bibliografio de vortaroj kaj terminaroj en Esperanto, 1887-2002". Temas pri entute 1079 titoloj. Sendube la listo ne estas kompleta, sed momente la plej plena. La Bibliografio estas trovebla en la retejo uea.org ĉe la adreso

**http://uea.org/dokumentoj/bibliografioj.html**

kaj estas prezentita en tri formatoj: HTML-versio, kiun oni povas konsulti rete, PDF-versio kaj RTF (arkivigita). Oni povas ilin elŝuti kaj konsulti laŭnecese en propraj komputiloj.

En la sama paĝo eblas trovi apartan Bibliografion de Esperantaj terminaroj, aperintaj en 1980-2002. Ĝi estas pli oportuna por tiuj, kiuj simple serĉas specifajn fakajn terminarojn, ĉar ĝi disponigas titolojn, ofte reale troveblajn en libroservoj. Krome, post pluraj titoloj, estas aldonitaj hiperligiloj, pere de kiuj oni povas transiri al la tekstoj de la terminaroj en diversaj E-retejoj. La bibliografio estis kompilita de Ĵerom Vashe kaj enretigita de Dirk Bindmann.

## Mond-sensacio kun Esperanto en librovendejoj

Okaze de la jarkongreso de la svedaj esperantistoj, ELDONA SOCIETO ESPERANTO prezentis sian plej novan libron "Nemesis – Nemeza". Temas pri tragedio verkita de Alfred Nobel (jes, tiu de la famaj Nobel-premioj!).

La aŭtoro verkis ĝin en sia lasta vivojaro kaj presigis ĝin en 1896, sed la tuta eldono estis tuj detruita. Temas pri dulingva eldono, sveda-esperanta, vera monda sensacio, ĉar ĝi estas kaj la unua eldono por svedoj kaj la unua traduko en iun ajn lingvon. La libro estas 253-paĝa kaj bele bindita. Eblas aĉeti ĝin en ordinaraj librovendejoj en Svedio kaj ĉe la esperanto-libroservoj.

## Interesa servo! Profitu de la historio!

EVENTOJ, la renoma Esperanto-gazeto, kiu informadis dum 11 jaroj pri la Esperantaj novaĵoj, reaperas, libere konsultebla, kiel plena interreta arkivo. Ĉiu esperantisto povas foliumi ties albumon vizitante la retpaĝojn ĉe:

**http://www.eventoj.hu**

En la arkivo troviĝas ĉiuj artikoloj de ĉiuj numeroj de ĉiuj pasintaj 11 jaroj. La plena teksto de la aperintaj 244 numeroj estas foliumebla. Je dispono taŭga serĉilo! Vi povas serĉi en la materialo de la arkivo per interreta serĉ-aŭtomato laŭ vortoj, nomoj, ka. La serĉilo redonas la artikolojn laŭ kvanto de la apero de la koncerna vorto kaj laŭ freŝeco.

En 244 numeroj de EVENTOJ aperis plurcentoj da artikoloj pri faka aplikado de Esperanto, pri movadaj aktivaĵoj, movadorganizaj demandoj, pri instruado, ktp. Vi povas ĉiun artikolon libere pluuzi menciante la fonton. Profitu la intelektan laboron de Esperantistoj! Aŭ se vi volas nur simple amuziĝi, legu artikolojn de la rubriko INTERESE.

Serĉu, legu, profitu... - EVENTOJ-arkivo!



## Monbiletoj en la reto per Esperanto

Kolektanto de monbiletoj kreis esperantlingvan retpaĝaron ĉe:

**http://papermonoj.fr.st.**

David Cholet ŝatus trovi homojn, kiuj sendus al li papermonojn el diversaj partoj de la mondo. Pliaj informoj ĉe:

David Cholet - 34bis, rue du vieux bourg,
FR-85170 Dompierre/Yon, Francio
rete: davidcholet@hotmail.com



La **11ª Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo** okazos ĉijare en Santa Susanna, Katalunio, Hispanio, de la 4ª ĝis la 11ª Oktobro 2003, en tristela modernega Hotelo Mercury, je 50 metroj de la plaĝo. Santa Susanna estas bela urbeto, 49 kilometrojn norde de Barcelono, ĉe Mediteranea Maro, proksima al la gravaj somerejoj Calella kaj Lloret. Okazos prelegoj, busaj kaj ŝipaj ekskursoj kaj ĉiaspecaj amuzaĵoj. Informojn donas rete: luis_serrano@mixmail.

## Solvo de la kvizo aperinta en la maja TEA-Bulteno

1) Kiujn lingvojn parolis hejme L.L. Zamenhof?

**B) Jida kaj rusa**

2) En kiu monato kaj jaro estis fondita UEA?

**C) 28 aprilo 1908**

3) Kiu skribis la libron "Virino ĉe la landlimo"?

**B) Marjorie Boulton**

Mi dankas la kvizludintojn pro ilia partopreno, sed ĉifoje, kun ega bedaŭro, mi devas anonci, ke neniu sukcesis, ĉar ĉiuj senditaj solvoj estis malkorektaj. Jes, oni diras "... ja, gravas la partopreno", sed... tamen!!! ĉu ne estus bone komenci iom pli serioze studadi la historion de nia lingvo kaj de ties movado? Tion mi tre varme konsilas al vi. Nun, dum la feri-periodo, vi nur ripozu kaj amuziĝu: en septembro, mi proponos eĉ pli "pezajn" solvendaĵojn, kiuj - mi esperas - stimulos vin legi kaj pristudi librojn pritraktantajn la Esperantan historion.

Bonan feriadon kaj ĝis la revido en septembro!

*Via Elda*

**Inform-artikoloj ŝuldeblas al RET-INFO, NUN kaj NOVA SENTO.**


BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via del Coroneo 15 - 34133 Trieste
**tel/fakso**: +39 040 763128
**Reto**: esperantotrieste@adriacom.it; nored@estelnet.it
**http**://arte.triesteincontra.it/esperanto
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349